

NENIU SOLVO KROM BALOTI

Pletora nombro de gekandidatoj

Pli ol trideko da gehomoj kandidatiĝis en la prezidenta balotado post pago de po Ariary 50 milionoj (proks. € 17.000). Bunta ecaro de kandidatoj :riĉaj negocistoj, vendistoj de sonamplifikiloj, artistokantisto, ĵusaj ministroj, intelektuloj, dinosaŭroj de politiko, du virinoj...Tamen elmergiĝis el la pletoro la kandidato de la transira reĝimo, kiu estas la ĵusa ministro pri financo Hery Rajaonarimampianina kaj tiu de la renversita reĝimo, kiu estis la tiama ministro pri sano (kaj poste pri sporto), la kuracisto Robinson. El la unua etapo de la balotado rezultis la venko de la kuracisto per 21 % super Hery, kiu akiris 16 % da voĉdonoj. Nekonata vendisto de sonamplifikilo, Dadafara surpizis ĉiujn pro siaj 6%. Multaj el la dinosaŭroj poentis 0,...%, kio permesas al ili mezuri sian respektivan popularecon.



Sovaĝa afiŝado

Usonmodela propagando

Miliardoj da Ariary (€ 1 egalvaloras al 3.000 Ariary) estis uzitaj de kandidatoj dum la propagando :afiŝoj 20m alta kaj miloj da T-vestoj fabrikitaj en Ĉinio, kvideko da aŭtoj 4x4 por akompani la kandidaton tra la urbo, helikopteroj por kelkaj, miloj da dungitoj por glui afiŝojn, grandaj spektakloj kun famaj kantistoj... Evidentiĝas ke la balotada regularo nenion menciis pri la financado de la balotadoj.

Dua etapo kun parlamenta balotado

Pli interesa estis la dua etapo de la prezidenta balotado por kiu multaj televidoj organizis debatojn inter ambaŭ kandidatoj. Hery prezentis pli seriozan bildon per siaj difinitaj programoj kaj akcentis siajn argumentojn pri la futuro de la lando. Male, Robinson apogis sin ĉefe per tro oftaj kritikoj pri la negativaj plenumitaĵoj de la nuna transira reĝimo, kio montris al la publiko ke li estas viro nememrega kaj la gazetistoj eĉ raportis pri lia ebrieco dum iu gazetara konferenco ! Mankis al li defenda taktiko ĉar li publike rekonis ke li membras en framasono, kio perdigis al li multe da voĉoj de la kristana komunumo. Li do neglektis la gravecon de la subteno de aliaj etaj kandidatoj al Hery. Sed alia interesa fakto estis la propagandoj far la deputitaj gekandidatoj. Ili ne plu kuraĝis (malkiel en la pasinteco) tro promesi konstrui ion aŭ financi ion ajn ĉar ĉiuj jam scias ke ili ne havas povon por tion fari. Ilia rolo koncernas nur la leĝfaradon. Tiu ĉi balotado tuŝas la ĉiutagan vivon de la popolo, oni rimarkis la multecon de gekandidatoj senpartiaj tamen daŭre akiris la majoritaton la partianoj de ambaŭ suprecititaj kandidatoj. Balotad-observantoj internaciaj estis pli ol 800 por observi kaj atesti pri la bona funkciado de la afero.

Partopreno de la Malagasoj

Malgraŭ la neperfekta preparado far la CENIT, aŭtonoma organo por organizi la balotadojn, 60% de Malagasoj voĉdonis dum la unua etapo sed la partoprenado malaltiĝis ĝis 50% dum la dua etapo.

(sekvo en la paĝo 16a)

LA LOKA ESPERANTO-MOVADO

KLUBA VIVO : I.E.K.

EK signifas *Itaosy Esperanto-Klubo* ĉar ĝia sidejo troviĝas en Avaratsena Ambohidadrapeto Itaosy, en iu municipo je sep kilometroj okcidente de la urbo-centro. Fakte, IEK estis starigita de Henriel en 2006 kaj tiam, li akiris la permeson de iu loka privata lernejo anglikana okazigi tie en ĉiu sabato matene Esperanto-kurson. Deko da gelernantoj partoprenis la kurson de 2006 ĝis 2009, kelkaj el ĝiaj membroj eĉ partoprenis la nacian kongreson en Vatomandry en 2008. Kaŭze de la granda malsameco de la aĝoj, Henriel estis devigita disdividi la lernantaron en du grupojn, kiuj disponis po unu lernoĉambron. Sed pro la politika krizo, la gepatroj ne plu tro emis sendi siajn infanojn al la kursejo. Sekve, ĉiuj membroj malaperis kaj malvarmiĝis la entuziasmo.



4 kursanoj restas el tiuj tute unuaj gekursanoj de IEK en 2006

Nun, danke al la projekto *Esperanto Plus Malagasio*, Henriel denove provis reaktivigi la klubon en februaro 2013. De tiam, la kurso okazas en lia domo en Avaratsena kaj la kursanaro konsistas el tri grupoj. Entute, li estas 3 infanoj, kiuj lernas en ĉiu sabato matene, 5 gestudentoj, en ĉiu merkredo posttagmeze kaj unu studentino, kiu partoprenas la lingvokurson ĉiusabate posttagmeze. Tiu ĉi lasta estas la plej malnova kursano. Denove aliĝas al la kluboj aliaj gejunuloj en tiu ĉi monato. La estro de la klubo nomiĝas Rina, Fitiavana la sekretariino kaj Najaina la kasisto. La infanoj tre ŝatas reciti poemojn en Esperanto kaj kanti Esperanto-kanzonojn dum la adoleskuloj preferas ludi skeĉojn. Ili senpacience atendas la okazigon de la venonta nacia kongreso.



La gelernantoj scivoleme diskutis kun nia gasto Philippe Chavignon el Francio



Same kiel aliaj kluboj, ni bezonas lernolibrojn, vortarojn kaj sonmaterialojn. Alia problemo estas la malvasteco de la lernoĉambro en la domo de Henriel sed IEK ankoraŭ ne havas financon eblecon por lui apartan kursejon. Ĉiujn informojn povas doni la kursogvidanto, bv mesaĝi al henrielredtv@gmail.com.

LA LOKA ESPERANTO-MOVADO


NI PREZENTU AL VI

RAMANITRA HENRI MELLON, estas la plej malnova kaj plej aĝa esperantisto (73 jaroj) en Malagasio. Fakte, li ekmemlernis Esperanton en 1959 danke al perkoresponda kurso de Francio ĉar en tiu epoko, Malagaso ankoraŭ havis la financon eblecon tion fari. Li estis ŝtatoficisto en la ministerio pri financo. Li estis kasisto de la tiama Esperanto-asocio dum kelkaj jaroj antaŭ ol esti translokigita en alia fora regiono. Jarojn poste oni ne plu aŭdis pri Ramanitra ĝis 1999, kiam li aperis antaŭ iu membro de la tiama Malagasa Esperanto-Unuiĝo (MEU). De tiam, li partoprenis en la vivo de la nacia asocio kiel vicprezidanto de MEU en la provinco Antananarivo. Ramanitra estas fame konata kiel barbulo, ege sprita viro kiu ĉiam ŝercas kiam oni babilas kun li en Esperanto. Li estas ankaŭ librovorema. Pro sana kialo, li preferas partopreni nek nacia kongreson nek ekskurson sed ofte



Ne mirige se bonstatas la sano de amiko Ramanitra pro la pureco de la aero kaj la trankvileco de la ĉirkaŭaĵo. De lia fenestro eblas vidi la belan panoramon.

li pagas la aliĝkoston al tiaj eventoj por helpi la asocion. Tamen, li estas ĉiam la unua membro, kiu aliras al la kasisto de la nuna Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj (UME) por pagi sian jaran kotizon. Se hazarde vi intencas viziti lin aŭ skribi al li, jen estas lia nuna adreso : **A.K.T.I. A 01 MANJAKA ANTANETY II 102 ALAKAMISY FENOARIVO**. Tiu loko troviĝas en la sudokcidento de la ĉefurbo je 15 km for de Antananarivo.



KORESPONDI DEZIRAS

La dua grupo de la kursanoj de IEK bezonas nun korespondemulojn kun kiuj interŝanĝi ideojn. Fakte, temas pri gejunuloj, kiuj jam lernis dudekon da horoj. Ili estas veraj komencantoj. Do la celo estas ne nur instigi ilin plu lerni sed ankaŭ montri al ili ke Esperanto tuj funkcias, ke ekzistas esperantistoj. Korespondado do povas reteni ilin en la klubo ĉar, laŭ nia sperto, gejunuloj fieras pri siaj korespondantoj al kiuj ili povas rakonti parton de sia vivo. Ne ĉiuj havas alireblecon al la reto. Nome de IEK, la kursgvidanto anticipas sian dankesprimon al vi ĉiuj :

N°	Nomo	Sekso	Aĝo	Poŝta adreso	Retadreso
1	RASOARIMANANA F. FI- NIAVANA	INA	16	LOT 5 BA 102 AMPI- TATAFIKA	
2	RANDRIAMIALITSO M. MINOARIDERA	INA	16	LOGT 33 FMAI 67 HA 101 ANTANANA- RIVO	
3	RAJAABELISAONA T.V. HASINA	VIRA	17	LOT IAF 120 A ANTA- NETIBE 102 AMBOHI- DRAPETO	tianakirahasina@yahoo.fr
4	RAKOTOMALALA HERI- MIANIRIANAARO	VIRA	18	LOT BA 60 BIS 102 AMPITATAFIKA	
5	RANDRIANIRINA TOKY NAJAINA	VIRA	17	IAH 32 BIS AVARATSENA 102 AMBOHIDRAPETO	rtokynajina@gmail.com
6	RAKOTOARISOA NOMENA	INA	20	LOT PN 15 102 AMBO- HIJANAKA	
7	RASOARIMANANA SA- RINDRA FITIAVANA	INA	18	LOT 5 BA 102 AMPI- TATAFIKA	
8	RANDRIANIRINA ANDY NASANDRATRA	VIRA	19	IAH 32 BIS AVARATSENA 102 AMBOHIDRAPETO	andynasa4739@gmail.com

LA VIVO EN NIAJ GRANDAJ URBOJ

TRA LA KVARTALO ISOTRY

Isotry apartenas al tiuj « varmaj » kvartaloj de la ĉefurbo, kien oni ne tiom multe konsilas al turistoj aliri. Tamen estas neniu danĝero se oni promenas tra tiu kvartalo forlasante en sia gastigejo sakon, fotilon, monon kaj aliajn valoraĵojn. Fakte, Isotry estas malnova kvartalo, kie loĝas precipe malriĉaj homoj. Ili strebas vivteni sin per diversaj etaj metioj kiel apudstrataj vendistoj, makleristoj, riparistoj de brakhorloĝo kaj poŝtelefono ktp...



Malnova domo en Isotry

Isotry situas inter Ampefiloha, Antohomadinika kaj Isoraka, ĝin trairas ĉefan vojon kondukanta al la urbocentro Analakely. Antaŭ jaroj, Isotry estis la plej vizitita subĉiela bazaro por tiuj kamparanoj, kiuj venis al Antananarivo. Famiĝis la kvartala bazaro pro la vestaĵoj tie venditaj, kiuj kongruis kun la kamparana vestmodo. Tuj alireblis ankaŭ surloka kudristinoj, kiuj lerte mezuris la ves-



Svarmas la diversstipa komerco, vendejo de malnovaj pneŭmatikoj senprobleme staras kun tiu de malnovaj ŝuparoj

tograndecon de la klientoj kaj revenigis ilin post du aŭ tri horoj por la liverado de la kudrita vesto. La granda bazaro havas ankaŭ halon, kie staras multe da rapidmanĝejoj. Sed nun, Isotry famiĝas pro siaj butikoj, kie hindopakistanoj vendas aŭtopecarojn, pro siaj brokantaĵoj kaj pro la vendistoj de freŝaj legomoj dum la sabata bazartago. En aparta loko de la subĉiela bazaro staras la vendejo de

sekigitaj fiŝaĵoj, kio donas putran odoron al la ĉirkaŭaĵo. La homoj iras ankaŭ al Isotry por aĉeti katon kaj kortobirdon. Tamen daŭre persistas la kampara spuro en tiu granda ba-



Kamparanoj aĉetas tie spatojn kaj aliajn ilarojn por la kultivado

zaro, fabrikistoj de « angady » (loka ŝpato) proponas siajn artiklojn ĉe iu butikoj preter la ĉefa strato, tiuj de kuiriloj mane fabrikitaj en Ambatolampy (urbo situata je 80 km sude de la ĉefurbo) vendas siajn varojn apud la policejo. Ĉiam svarmas la homoj en Isotry kaj tio favoras la fiagon de poŝtelistoj.

Alia menciinda loko tie estas la teatra domo sed ĝi jam perdis sian prestiĝon pro tio, ke la malagasa teatro ne kapablis prezenti al la junulara publiko pli interesan bildon, ĝi nur ripetis tion, kion oni ludis en la 30aj aŭ 40aj. Al Isotry aliras ankaŭ multaj varbutistoj ĉar tie estas pograndoj, kiuj proponas multajn varojn kun interesaj prezoj. Troloĝata estas la kvartalo Isotry tia, ke la vendistoj jam okupas trionon de la ŝoseo. Malpuras la kvartalo kaj ofte inundita estas ĝi dum la pluva periodo.



TRINKI KAFON PRETER LA STRATO

Malagasoj kutimas trinki kafon, kelkaj homoj trinkas kafon eĉ plurfoje en la tago. Tial oni povas vidi kafvendejon ĉie apud la strato aŭ ene de subĉiela bazaro. Tiaj vendejoj tuj rekoneblas, ili ampleksas apenaŭ du aŭ tri metrojn kvadratajn kun malgranda vitrino, kie oni metas malagasaĵajn panojn diverstipajn : *mofogasy* (lit. malagasa pano) farita el rizfaruno, *ramanonaka* (sama kiel *mofogasy* sed kun iom da faruno kaj multe pli da oleo, *menakely* (ete ruĝa) fabrikita el faruno, *maka-saoka* (probable el la vorto *mikasaoka*, kiu signifas brueti ĉar ĝi kroksonas) farita el faruno...Klientoj staras ekster la vendejo, sur la tablo jam troviĝas skatolo da sukero el kiu ĉiuj rajtas elpreni iom da sukero por aldoni en la tason. Kliento povas mendi nigran sukerigitan aŭ laktan kafon sed la lakton nur vendisto mem aldonas en la tason. Malagasoj ne kutimas trinki tiun nigran kafon sensukeran.

Aparte ŝatata estas forta kafo kaj homoj el la sudo de Antananarivo (Ambatolampy, Faratsiho, Behenjy)



famiĝas pro aparta talento teni kafvendejon en la ĉefurbo kaj eĉ en aliaj regionoj. Se la kafo proponita estas « *matsatso* » (t.e. senforta, kies koloro estas klara), la vendejo certe perdos sian klientaron. Foje, pro la multekosteco de la kafo, kelkaj fivendistoj enmikse rostas kafon kun iom da maizo, kio ŝanĝas la guston de la kafo.

De la kvara am ĝis la sesa pm eblas aĉeti kafon en tiaj vendejoj. Unu taso da kafo kun lakto kostas 200 ariary (per la sama mono eblas aĉeti dek bombonojn) sed foje la kliento mendas nur duonan tason. Laŭ la vendistoj, la malvarma periodo kaj dum la pluvo, klientoj multas en la vendejo. Kafvendejo proponas ankaŭ malagasan teon (ian specon de infuzaĵo), lakton kaj eĉ kakaon. Kafvendejo estas privilegia loko por babilado, kie renkontiĝas la samkvartalanoj.

NI LERNU IOM PRI LA MALAGASA

Antaŭ ĉio, necesas precizigi ke la malagasa lingvo estas parolata kaj komprenata ĉie en la tuta insulo (kaj ankaŭ en la insuletoj). Ĝi havas ununuran sintakson sed la vortotrezoro kaj la prononcado de kelkaj sonoj diferencas de iu regiono al alia, de iu tribo al alia. Ĉar intensa estas la kontakto inter la regionoj, la vortotrezoroj uzitaj dum babilado intermiksiĝas unu la alian sed tio ne ĝenas la komprenon de la mesaĝo. Sed pro historiaj kialoj, la dialekto de la centra altebenaĵo estas la oficiale uzata, tio ne malhelpas la uzadon de lokaj dialektoj en oficeja interparolado, dum la kurso en la lernejo aŭ dum la meso en la preĝejo... Ni proponas al vi kelkajn ekzemplojn por montri tian riĉan sinonimecon :

	Centra altebenaĵo	Suda altebenaĵo	Nordokcidento	Oriento
Infano	ankizy	kilonga	tsaika	tsaiky
Virino	vehivavy	vehivavy	vaiavy	viavy

Kiel prononci la malagasan ?

Malagasa vorto estas prononcata preskaŭ same kiel tiu de la esperanta : la akcento ĉiam troviĝas ĉe la antaŭlasta silabo :

Vehivavy [ve-hi-va-vi] kie -va subportas la akcenton, -hi estas prononcata kiel en "hieraŭ".

Tsaika [ca-i-ka] kie -i subportas la akcenton.

Kilonga [ki-lu-nga] kie -lu subportas la akcenton, -ng estas prononcata kiel en "Domingo".

Fandriana [fa-ndri-a-na] (=lito, dormejo, kuŝejo) kie -a subportas la akcenton, el -ndr, la dr estas prononcata kiel en la angla "drive".

Nun, ĉu vi kapablas legi kaj prononci la nomon de kelkaj reĝoj en Malagasio ? Andrianampoinimerina (=la noblulo/reĝo al kiu submetiĝas la Merina (kiu estas la ĉefa tribo de la centra altebenaĵo)) ; Andriatsimitoviaminandriandehibe (=la noblulo/reĝo, kiu ne similas (eĉ) al la plej granda noblulo/reĝo).

TIPA PLADO : RAVITOTO KUN KRUDA ARAKIDO

Unu el la tradiciaj elementoj de la malagasa plado estas ravitoto (*ravi* = *ravina* = arbfolio ; *toto* estas la radiko de la verbo *mitoto*=pisti). Ĝi ja konsistas el folioj de maniokoj pistitaj ĝis tia grado ke la tuto donas aspekton de malmola pasto kun iom da verda likvaĵo. Nepras ĝuste gardi en ĝi tiun likvaĵon. Dum la malvarma sezono (de majo ĝis septembro), la lokaj homoj preferas ne manĝi *ravitoto*-n ĉar ĝi havas maldolĉan guston. Kion ajn oni aldonas al la *ravitoto*, oni ĉiam bezonas oleon aŭ grasaĵon por ke la preparitaĵo estu bongusta. La maniero kuiri *ravitoto*-n varias laŭ la regionoj. En la centra altebenaĵo, la tieuloj kutimas enmiksi ĝin kun porkaĵo aŭ graso bovaĵo. Eblas ankaŭ kuiri ĝin kun kruda aŭ rostita arakido. En la marbordo, oni kuiras ĝin kun grataĵo da kokus-kerno aŭ kun kokusa laktaĵo. Sed por simpligi, ankaŭ sufiĉas aldoni oleon en la *ravitoto*-n. Cetere, la *ravitoto* estas uzata por faciligi la kuracadon de la cisticerkozo ĉar ŝajnas ke ĝia suko entenas ion, kiu povas malmoligi la kalciigintan cisterkon, kio allasas la enpenetriĝon de medikamentoj en la larvon. Tial la paciento devas manĝi apenaŭ kuiritan *ravitoto*-n ĉiutage sen forgesi la klasikajn medikamentojn. Ĉar la *ravitoto* estas unu el la plej karakteriza nacia plado, Malagasoĵ kiuj loĝas eksterlande « importas » ĝin pere de vojaĝantoj sed por tion fari, oni devas sekigi la paston, kio perdigas la plej bonan guston kaj parfumon al tiu manĝaĵo. En subĉiela



bazaro, la vendisto proponas jam pistitan paston sed oni povas ankaŭ aĉeti freŝajn maniokfoliojn se oni disponas tempon kaj ilon por pisti ilin. Entute, manĝi *ravitoto*-n estas malkonsilata al homoj, kiuj suferas stomakdoloron ĉar tiu manĝaĵo produktas sufiĉe da acido, tial oni aldonas en la paston iom da sukero. Kiel Malagasoĵ manĝas tian pladon? Tutsimple kun varma rizo kaj eble kun iom da spico.

Jen ekzemplo de recepto por 4 homoj :

Ingrediencoj :

- 200 g da freŝa ravitoto
- 100 g da kruda aŭ rostita arakido, kiu estis pistita
- salo
- iom da sukero

Preparado :

Metu en la kuirilon la ravitoto-n kaj tuj aldonu enen la arakidon. Mergu ĉion sub varma akvo kaj poste metu la kuirilon sur fortan fajron dum unu horo. Kiam bolas la tuto, miksu la paston kun la pistita arakido. Aldonu salon kaj antaŭ ol surtabligi, metu iom da sukero en la paston. Oni manĝas ĝin kun varma rizo. Ĝi havas alian pli interesan guston se oni lasas ĝin malvarma dum plia duontago.



LA MALAGASA PROVERBO

-difino :

Popola maksimumo, enhavanta konsilon aŭ konstaton pri la ĝenerala, psikologia aŭ morala veraĵo, tiel PIV 2005 difinas proverbon. Koncerne la malagasan proverbon, oni devas aldoni al tiu difino la fakton, ke la malagasaj prapatroj inventis kaj multe uzis ĝin en ĉiu ajn momento de sia vivo kaj el ĝi speguliĝas la tradicia pensmaniero (por ne diri la filozofion) de Malagaso.

-aspekto, formo kaj temoj

La malagasa proverbo ne obeas al strikte difinita formo malsame kiel tiu de Esperanto. La temoj tuŝas la vivon, la morton, Dion, la kosmon... La longeco varias funkcie de la enhavo. Ni proponas sube kelkajn ekzemplojn kun la esperanta libera traduko, hazarde elektitajn el la plej uzitaj ĉiutage:

Trano atsimo sy avaratra ka izay tsy mahalen-kialofana.

Domoj situataj unu sude kaj la alia norde, oni eniras tien, kie eblas ŝirmi sin kontraŭ la pluvo. Tio signifas la neceso interhelpi okaze de malfeliĉo.

Ny hazo avo halan-drivotra.

Altan arbon malamas la vento. Tio signifas ke alta socia pozicio vekas ĵaluzon.

Mpirahalahy mianala, izy tokiko ary izaho tokiny.

Pri du fratoj, kiuj kune eniras arbaron, li fidus je mi kaj mi fidus je li. Tio signifas ke reciproka fido estas forto en si mem fronte minacon.

Sambo-balala main'andro ka raha tsy azoko anio, azoko rahampitso.

Kaptado al kriktoj dum nepluva periodo, se mi ne sukcesas hodiaŭ, morgaŭ mi trafos ilin. Tio signifas ke malsukceso ne malhelpas plu esperi kaj persisti.

Tsara tarehy peta-korona.

Belulino tamen kun plata nazo. Tio signifas ke iu eta difekto fuŝas ĉion.

Misao-bady tanora ka manome zara ny sasany.

Divorci disde iu juna edzino favoras la sorton de iu alia viro. Ĉar la virino tuj akiros alian edzon.

Ny ririn-dasa tsy tsaroana.

La lasta vintro ne plu remembreblas. Tio signifas ke kio estis farita en la pasinta tempo estas facile forgesita ; ĝi povas aludi pri sen-dankemo.

Ny toky fitaka fa ny atao no hita.

Promeso estas trompo sed faro estas konstatebla. Do oni povas taksu kaj juĝi iun nur per lia ago.

Ny fitiavana tsy raikitra tsy maharatsy fihavanana.

Amo malsukcesa ne ruinigas la amikecan rilaton. Temas pri prova geedziĝ-periodo dum kiu ambaŭ geuloj sin taksas unu la alian, se unu el ili ne findecidas kontrakti nupton kun la alia, la familioj de ambaŭ daŭre rilatas en bona amikeco, sen ia ajn rankoro.

Mpiandry omby volavita, tsy tompony fa mpamerin-doha.

Gardisto de bovo « volavita » (nigra bovo, kiu havas surfrunte blankan makuleton) ne estas la posedanto de la bovo sed nur ĝia redonanto. Tia bovo, konsiderata kiel sankta, apartenas aŭtomate al la reĝo, do la posedanto devas transdoni la beston al (la reprezentanto de) la reĝo.

-uzado :

en la ĉiutaga vivo : ĉefe en la kamparo kaj babilante kun maljunuloj, oni ofte aŭdas proverbojn, kiuj nerimarkite enŝovas la konversacion por konfirmi iun ideon. Evidentiĝas ke la nuna generacio ne ĉiam komprenas ilian signifon.

dum la kabary : « kabary » temas pri oficiala prelego dum nuptofesto, enterigo aŭ iu alia familia kaj socia eventoj, kie necesas aparte danki la ĉeestantaron. Do taksita tre kapabla estas tiu, kiu povis kapti la atenton de la publiko per uzado de sinsekvaj proverboj interplektitaj en kompleksajn ideo-ĉenarojn. Tio tuj videblas el la reago far la publiko, kiu jen ridas jen miras jen admiras jen kapjesas...Sekve, la funkcio de la proverboj estas ilustriva kaj argumentiva por konvinki.

en literaturo : same kiel en prelego, verkisto uzas proverbojn por ilustru kaj argumenti sed ambaŭ agoj pli celas estetikon.

-kultura valoro nuntempe :

Proverbo estas daŭre uzata en kiu ajn momento de la vivo sed oni apenaŭ vidas ĝin en gazetara artikolo. Fakte, proverbo uziĝas ĉefe parole tiel, ke ĝia formo fiksiĝis. La nunaj « mpikabary » (prelegistoj) provas pli malpli bone ŝanĝi aŭ modernigi ĝin sed ili ne trovas favoran eĥon flanke de la publiko. La malnova formo rezistas kaj persistas. Ĉiokaze, « kabary » sen proverboj estas io sensuka, kiu riskas torpori la aŭskultantaron.

MANARTAĴOJ

Vitrino de la lando :

Viziti la vicojn da butikoj ĉe la ŝoseo kondukanta al la internacia flughaveno estas kutima afero por turistoj. Tre varias la produktaĵo kaj ĝi devenas de la kvar anguloj de la lando. Marbordanoj famiĝas pro siaj korboj, ornamaĵoj kaj ĉapeloj el diversaj vegetaĵoj. Tiuj de la centra altebenaĵo uzas ankaŭ vegetaĵojn sed aldoniĝas al tio la fabrikado de metalaĵoj kaj nun de plastaĵoj.

Ĉenaro de produkado :

La krudmaterialoj ofte troveblas en la kamparo mem, alie oni devus aĉeti ilin. Dum sia libera tempo, kamparanoj okupiĝas pri fabrikado de manartaĵoj. La kvanto kaj la formo dependas de la mendo far la makleristoj-vendistoj. La kamparanoj mem ofte iras al la urbocentro por liveri la artiklojn. La kvalito dependas de multaj faktoroj kaj ĝi ŝanĝiĝas de iu fabrikisto al alia. Pri la prezo, kamparanoj-fabrikistoj plendas pri tio, ke ili apenaŭ akiras profiton pro la nuna kosto de la krudmaterialoj kaj pro la altiĝo de la transportkosto. Sed estas malfacile al ili trovi rekte klientojn.

Problemoj :

Oni povas citi kelkajn problemojn :

- Malpliigo de la krudmaterialoj, ekzemple nur en la nordokcidento de la insulo abundas nun rafio sed la vojo tien kondukanta estas ege malfacila.
- Ofte plendas klientoj ke metiistoj ne respektas la daton de la liverado, kiu suferas prokraston.
- Tro profitas la makleristoj-vendistoj, kiuj ja kapablas organizi ekspozicion en la urbo, partopreni internacian foiron kaj eĉ eksporti manartaĵojn. Jam multas retpaĝoj de ili pri vendado de manartaĵo.



Dekstre staras ornama kuirpoto el pailisandro kaj sub la foto aŭtetoj fabrikitaj el metalaj boteletoj



(sekvo de la antaŭa paĝo)

-La lokanoj apenaŭ aĉetas ĉar kelkaj opinias ke pli prestiĝas la importitaj artikloj, iuj aliaj taksas manfaritaĵojn malbonkvalitaj. Alia problemo estas la tro alta kosto (« turista prezo ») de la varo por la lokaj klientoj.

-Manko de profesieco ĉar fabriki manartaĵon estas nur aldona enspezo, do mankas plibonigo de la scioj.

-Ĉinaj manartaĵoj invadas la merkaton, ili estas malmultekostaj tamen belaspektaj.

Kelkaj kamparanoj aniĝis en kooperativoj kaj sukcesis trovi klientojn en eksterlando. Tamen, ili ne kapablas fabriki multkvante. Antaŭ kelkaj jaroj, iu kooperativo ricevis mendon de Usono, la kliento bezonas en ĉiu monato 100.000 pecojn da ĉapeloj faritaj el iu vegetaĵo. Fakte, tute ne eblas plenumi tian mendon kaj neimageblas la aĉa konsekvenco sur la medio se la kamparanoj havus tian eblecon !

Malgraŭ la starigado de ministerio pri manartaĵo kaj metiarto, la registaro alportas neniun konkretan helpon al niaj kamparanoj-metiistoj. Ekzemple, tradicia papero *Antemoro* (nomo de tribo loĝanta en la sudoriento) ne estis leĝe protektata, tial iu firmao en la apuda insuleto Maŭricio « ŝtele » registras ĝian fabrikadon ! En Malagasio, bezonatas granda monsumo por registri inventaĵon kaj kamparano neniam havas tian eblecon. Manartaĵo estas ligita kun turismo kaj ebligas al la koncernitoj bone enspezi, tiel estas la situacio kiam ŝipkrozistoj venas ĉe kelkaj marbordaj urboj de Malagasio, preskaŭ ĉiuj artikloj forvendiĝas en kelkaj horoj.



Por protekti la faŭnon kaj flaŭron, estas malpermesite eksporti tiujn manfaritaĵojn faritajn el palisandro kaj el aliaj valoraj lignaĵoj, kio malfaciligas la laboron de la kamparanaj metiistoj



REKTE AL LA MUNICIPO AMPANGABE

Ampangabe situas je 15 km nordokcidente de la ĉefurbo. Necesas pli ol unu horo por trafi tiun urbeton per buso kaŭze de la malbona stato de la vojo tien kondukanta. La buso iras de la kvartalo 67 hektaroj en la urbo-centro, laŭiras la ŝoseon al la internacia flughaveno sed alvenante ĉe la famaj bazaroj de malagasaj manartaĵoj, oni direktiĝas al la maldekstro, ĉiam paralele al la rivero Ikopa.



Poste sin prezentigas la municipo Ambohitrimanjaka kaj sekvas ĝin tiu de Anosimanjaka antaŭ ol eniri la municipon Ampangabe. Plimulto de la enloĝantoj estas kamparanoj, tio signifas ke ili ĉefe kultivas rizon, maniokon,



Ampanga kaj aliaj vegetaĵoj ja multas tie

maizon, legomojn k.s. kaj samtempe bredas bovojn, porkojn kaj kortobirdojn. De tempo al tempo kelkaj el ili fiŝkaptas ĉe la apudaj riveretoj aŭ lagetoj sed ili okupiĝas ankaŭ pri fabrikado de manartaĵo kiam ili finis la kampajn laborojn. Tial Ampangabe signifas « multe da am-




panga (specio de filiko, kiu plenumas la marĉon de Ampangabe) », El tiu vegetaĵo la kamparanoj fabrikas korbojn kaj subtason laŭ la mendo far la enurbaj vendistoj.

Ampangabe estas ĉarma urbo pro sia kvieteco sed vizitantoj tuj rimarkas la nudecon de la ĉirkaŭaĵo. Mankas ja arbaro pro la konstanta uzo de karbo por kuiru la manĝaĵon. Kaj la loka administracio ne kapablas instigi la kamparanojn plu kultivi arbojn. Plie, tiu kamparo suferas ankaŭ migradon de siaj gejunuloj al la ĉefurbo. Malgraŭ tio, oni povas diri ke Ampangabe progresas. Nun, la centra urbano disponas elek-

tron kvankam ĉiuj devas preni akvon el la puto. Modernaj grandaj domoj stariĝas tie ĉar multaj riĉaj lokanoj decidis resti tie. Oni povas trovi ankaŭ elektran rizmuelejon, kio ebligas faciligi la laboron de la kamparaj virinoj al kiuj oni tradicie donis la taskon pisti la rizon. Eblas ankaŭ uzi poŝtelefonojn kaj kapti kelkajn televidprogramojn de la ĉefurbo. Sed ne ĉiuj kamparanoj eĉ tiuj de la centra urbo havas tiajn privilegiojn, multaj homoj vivas malriĉe ĉar ili ne disponas sufiĉe da laboriloj por plialtigi la kvanton de la rikolto dum persistas ankaŭ analfabeteco. Cetere, malsano trafas la porkojn sed kamparanoj ne havas monon por voki best-

kuraciston. La enurbaj vendistoj de manartaĵoj ankaŭ plendas pro manko de eksterlandaj klientoj pro la politika krizo en Malagasio. Do la homoj en Ampangabe provas forgesi la vivmalfacilaĵon per la

raraj spektakloj, kiuj okazas dum la seka periodo. Ne mirinde se oni renkontas multajn virojn en butikoj, kie vendiĝas alkoholaĵoj kaj eĉ virinoj nun kuraĝas eniri tien. Gejunuloj provas, de tempo al tempo, okazigi piedpilkan matĉon sed ĉiuj konscias pri tio, ke la proponitaj distraĵoj ne sufiĉas por reteni la junularon plu vivi en la kamparo. Feliĉe ke daŭre fortas la familia ligiteco en la malagasa kamparo, kio revenigas la foririntojn --- almenaŭ dum la



familiaj festoj --- por viziti la gepatrojn kaj la parencon.


TRADICIA ARĤITEKTURO DE LA CENTRA ALTEBENAĴO



La tradiciaj domoj en Antananarivo estis konstruitaj ekde la dua duono de la XIXa jarcento, unue en la supra parto de la urbo proksime al la palaco de la reĝino kaj pli poste en la mezalta parto de la ĉirkaŭantaj montetoj. La formo de tiu tipo de arĥitekturo klarigeblas per la klopodo de la homoj sin protekti kontraŭ la ŝtelisto. Sekve, ili restis en la supra etaĝo dumnokte forpreninte la solan ŝtuparon, kiu ebligas supreniri tien. Tiaj domoj estas altaj.



Sed pliposte, tiu arĥitekturo profitis pliboniĝon el « mestizado » ĉar kelkaj eŭropaj arĥitektoj troviĝis en Antananarivo en 1830 kaj adaptis la lokajn domojn per aldonoj de novaj elementoj de argilmasonaĵo. La nova modelo simbolis socian sukceson: la konstruaĵo havas unusolan etaĝon, duoblan tegmenton deklivan, verandon inspiritan de la kreolo kaj internan ŝtuparon. En la XIXa jarcento, temis antaŭ ĉio pri loĝejo de religiaj misiistoj el Norvegio aŭ Anglio. La angla arĥitekto James Cameron lanĉis la modelon de domo fabrikita kun argilaj brikoj, kiu populariĝis kaj donis al la tuta supra parto de la montetoj en Antananarivo homogenan kaj originalan pejzaĝon. La etburĝanoj de la centra altebenaĵo adoptis tiun arĥitekturan modon. Bedaŭrinde, pro manko de protektaj leĝoj kaj nesufiĉo de ĝe-



Domo de misiistoj konstruita meze de la XIXa jarcento



Bela konstruaĵo de riĉa kamparano

nerala konsidero pri la valoro de tia trezoro, la tradiciaj domoj pli kaj pli malaperas el nia vido.



SENSTATUTA PROFESIO : AŬTOGARDISTO

Behoririka troviĝas en la urbocentro, ĝi estas la « China town » (ĉina kvartalo) de Antananarivo de deko da jaroj. Vendistoj estas ne nur en la multenombraj butikoj modernaj sed ankaŭ ĉe la duona parto de la strato sen forgesi tiujn vendejojn instalitajn ĉirkaŭ la laĝetoj. Pro tio estas malfacile trovi liberan lokon por parki la aŭton. Do ĉirkaŭ la lago pacience gvas siajn klientojn junuloj. Ĉiu kvadrata metro estas transformita en parkejon. Ili mirinde aranĝas la sinsekvajn alvenojn kaj forirojn de la aŭtoj. Kiuj estas tiuj magiuloj ? Pli-multo de ili estas senlaboruloj aŭ eks-prizonuloj.

La situacio estas preskaŭ la sama en ĉiuj parkejoj de Antananarivo, tamen la aŭtoparkejo ĉirkaŭanta la laĝeton Behoririka estas disdividita en plurajn areojn. Tiu de Ndrema longas proksimume 120 metrojn kaj li laboras kun du aliaj kamaradoj. Fakte, ili apartenas al la teamo de rugbeo de la kvartalo kaj la kvartalestro donis al ili la permeson gardi aŭtojn tie. Parton de la enspezo ili ofertas al la klubo. Sen la permeso far la kvartalestro, la municipo ne konsentas ke tiu loko iĝos parkejo. La gardistoj alvenas je la sesa kaj forlasas la lokon je la kvina pm krom dimanĉo. Sabaton kaj antaŭ la festoj multas la klientoj. Tiuj viroj (ĉar neniu virino ne faras tian laboron) ebligas al la aŭtistoj parki siajn aŭtojn sed samtempe ili garantias ankaŭ la sekurecon por malhelpi aŭ malpersvadi la ŝtelistojn. Cetero, ili ne rajtas « postuli » de la klientoj koston sed tiuj volonte donas al ili 200 ariary (per kiuj eblas aĉeti bastonforman panon po 100 gra-



moj). Sed okazas kelkfoje ke la klientoj foriras nepagante. Tamen, granda estas la risko ĉar se iu mankas en la gardata veturilo, la aŭtistoj tuj fingromontras la gardistojn kiel komplicojn de la ŝtelisto. Aliflanke, ili povas ankaŭ lavi la veturilon se la kliento pretas krompagi 1000 ariary. Se pro manko de spaco, la kliento devas stari antaŭ iuj aliaj aŭtoj, la ŝoforo nepre restos en la aŭto kaj movos ĝin se necese. Ndrema plendas pro tio, ke ofte la municestro decidus malpermesi ilin labori. En aliaj kvartaloj kun grandaj varbutikoj, la municipo jam transprenis la laboron kaj postulas de la uzantoj 200 ariary po unu horo. Ndrema gajnas averaĝe 3000 ariary en la tago, kio ebligas al li aĉeti iom da rizo, legomon, alumeton kaj kandelon por la familio kaj trinki unu aŭ du glasojn da rumo antaŭ ol rehejmenigi.



Jen aŭtisto serĉanta liberan lokon sed oni devas iom atendi la intervenon de Ndrema



Jen aŭtisto serĉanta liberan lokon sed oni devas iom atendi la intervenon de Ndrema

ARBARON VIKTIMAS BRULIGA KARBO

De la okcidento al la sudo de La Granda Insulo, nuda grundo ornamas la montaron, la raraj arboj, kiuj staras tie kaj ie fantome ombras la ĉirkaŭaĵon. Fakte, dum la seka periodo, kiu etendiĝas de majo ĝis oktobro, ofte nekonatoj forbruligas la savanon kaj la herbaĵon de la montoj en tiuj regionoj por havigi al la bestaro verdaĵon pliposte. Tamen se oni vojaĝas tra la orienta parto de Malagasio, ambaŭ flankoj de la nacia vojo N°2 daŭre havas arbaron kaj verdaĵon sed videblas de tempo al tempo lokoj maldensaj ĉar kamparanoj kutimas bruligi tie parton de la arbaro cele al plantigo de rizo kaj manioko. Kaj en la sekvanta jaro, oni translokiĝas al alia bruligebla grundo.

Fabrikado de bruliga karbo

Alia kaŭzo de arbara detruigo estas la fabrikado de bruliga karbo. Milionojn da kuba metro da ĝi ĉiujare bezonas la urbanoj por kuiri siajn manĝaĵojn, ja nur malpli ol 5% de Malagasio havas la eblecon uzi gason aŭ elektron. Dum la pluva periodo de novembro ĝis majo, altiĝas la kosto de la bruliga karbo ĉar malfacilas al ŝarĝaŭto eniri en arbarajn lokojn por transporti la varon. Ekzemple ĉi-monate, unu sako da karbo, kiu pezas 60 kg kostas 10.000 Ariary (t.e 1/10 de la baza salajro de simpla laboristo). La arbarozaj regionoj kiel Manjakandriana (oriente) kaj Ambatolampy (sude) provizas la ĉefurbon per bruliga karbo kaj plimulto de la uzita arbo estas eŭkalipto. Tamen, ŝajnas ke en la nordo de Malagasio, dum la ciklona periodo (februaro), valoraj arboj kiel palisandro aŭ ebena disfalas meze de la fora arbaro kaj kamparanoj trovas neniun solvon krom fabriki el ili karbon por enspezi.

Timida entrepreno

La ĉefa problemo estas ke kamparanoj ne komprenas ke ili pli kaj pli detruas la medion. Virinoj devas trairi de unu ĝis kvin kilometroj por trovi bruligeblajn sekajn branĉetojn por la kuirejo. Kelkaj Ne-Registaraj Organizoj (NROj) aktivis en la urboj kaj en la kamparoj por konsciigi la enloĝantojn pri la neceso, se ne forlasi la karbon, almenaŭ redukti ĝian uzadon en la kuirado. Iuj homoj inventis specialan bruligan karbon faritan el pasto de rubaĵoj, ili nomas ĝin « pura karbo » ĉar ĝi ja ne malpurigas la manon. Sed la virinoj taksas ĝin luksa pro ties alta kosto. Aliaj NROj instruas al grupoj da homoj fabriki argilan fornon, kiu ŝparas karbon, iuj aliaj sunan fornon jen el metalo jen el vitroj. Malgraŭ tio, nur etan parton de la enloĝantoj trafas tiuj NROj ĉar la registaro apenaŭ pretas helpi ilin.

Estonta solvo

Ĉiuokaze, Malagasio ne povas daŭre vivi en la sama situacio. Nepras trovi eblecon por ekspluati la riĉan fonton el la ĉiutaga suno, vento kaj la fluantaj riveroj. Eblas ankaŭ multobligi la uzadon de biogaso en la kamparo. Sed la registaro ne sufiĉe multe investas en tio ĉio kaj kelkaj homoj ŝajne akiras profiton por ke la nuna aĉa situacio daŭru.



Tiu baobabo de la sudokcidento estas sola meze de la vasta savano



Kamparanoj opinias ke forbruligi la grundon rapidigas la kreskon de la herbaĵo por nutri la brutaron



Malgraŭ la pluva periodo, kiom nuda estas la ĉirkaŭaĵo !

JOSIANE, NE NUR INSTRUISTINO PRI LA MALAGASA

Si voknamiĝas Josiane, 48 jaraĝa kaj profesias kiel instruisto pri la malagasa lingvo en la katolika gimnazio Saint-Michel Itaosy. Ŝi havas unu solan filinon, kiu estas nun profesia akuŝistino ĉe iu privata hospitalo de la ĉefurbo.

Ŝi pasiĝas pri sia profesio sed ŝi ankaŭ konscias nun pri la malfacila tasko instrui la lingvon al la junaj gimnazianoj. Fakte, la nuna generacio regas nek sian gepatran lingvon nek la francan. Kiam ŝi korektas la testfoliojn de la lernantaro, ŝi rimarkis ke la infanoj ne kapablas taŭge skribi kelkajn malagasajn vortojn, ili ne plu pensas en la malagasa pro la fuŝa influo de la televida kulturo. De dudeko da jaroj ŝi instruas en la sama lernejo kaj ŝi sentas ke ŝanĝiĝas la karaktero de la nuna generacio, ĝi ne tiom multe respektas la tradiciajn valorojn. Ŝi opinias ke eble tian situacion kaŭzas ankaŭ drogaĉo kaj alkoholaĵo minacantaj la lernantaron. La gelernantoj facile aliras al tiu afabla virino en la korto de la gimnazio dum la paŭzo sed ĉiuj scias ankaŭ ke S-ino Josiane estas rigora kaj iom severa kiam ŝi troviĝas en la klasĉambro.



Daŭre aktiva virino (maldekstre)

En ĉiu tago, ŝi vekigiĝas je la 5a am kaj piede iras al la gimnazio dum kvarona horo. Instrui, korekti surloke aŭ hejme, prepari la kurson, diskuti kun gekolegoj pri la semajna laborprogramo, serĉi malnovajn interesajn librojn en la brokantaĵejoj de la urbocentro, renkonti la gepatrojn de iuj lernantoj pro iuj kialoj, viziti la hejmon de lernantoj, kiuj longedaŭre malĉeestis la kurson...Tiom da laboroj, kiu estas temporaba kaj suĉas ŝian energion. Josiane mencias ankaŭ malagrabraĵon, kiu foje okazas en la

lernejo : gelernantoj svenis ĉar ili ne matenmanĝis, knabinoj nepreparite menstruis, lernantoj ŝtelintaj la valoraĵojn de siaj kamaradoj...Malgraŭ tio, ke ŝi apartenas al evangelia preĝejo, la estraranoj de tiu katolika lernejo vidas en ŝi la modele seriozan instruistino kun kiu ĉiuj ŝatas kunlabori.

S-ino Josiane estas ankaŭ fervora membro de la loka evangelia ĥoruso kaj en ĉiu dimanĉo, ŝi partoprenas agadojn en la preĝejo. Krome, ŝi respondecas ankaŭ pri la etaj skoltanoj de la preĝejo. Ŝi diris ke ŝi ne povas vivi sen fido kaj espero. Tiel ŝi povis eduki sola sian filinon kaj kiam tiu lasta studis pri akuŝado en iu privata instituto post sia bakalaŭro, Josiane devis multe ŝviti por pagi la jaran studkoston, kiu sumis ĝis € 300, « eĉ sandalojn mi ne plu povis aĉeti por mi » ŝi ridete konfesis, pro la nesufiĉo de mono en la familio. Sed dum tri jaroj, ŝi eltenis tion ĉion kaj nun, ŝi povas fieri pri sia filino, aŭtonoma kaj ĵus edziniĝinta. Krom kanti (ŝi ja havas belan voĉon), ŝi ŝatas legi librojn kaj viziti aliajn regionojn. Cetere, ŝi neniam apartenis al iu ajn politika partio, fakte, ŝi malŝatas politikon ĉar ŝi konstatas ke politikistoj sin amuzas fitrompi la popolon kaj eĉ provokas kverelojn inter la simplaj civitanoj cele al persona profito kaj politika posteno.

Ŝi deziras ke la paco revenu en Malagasio post la ĵusaj balotadoj. Ŝi ja suferas rigardante tiujn milojn da infanoj kies gepatroj ne kapablas pagi la lernokostojn pro la longedaŭra politika krizo.



Josiane estis kontrolanta la kuirejon de la skoltanoj dum iu tendumado

el la redaktoro

Finfine aperas la unua numero de nia gazeto, kiu klopodas montri al vi la ĉiutagan vivon de simplaj civitanoj en Malagasio. Foje ni turisme ĉiĉeronas vin en neporturistaj kvartaloj, ĉar tie efektive vivas multaj Malagasoj. Tamen la redaktoro konscias pri la limo de sia ebleco, li ja ne havas profesionan karton de ĵurnalisto kaj foje estas malfacile al li foti aŭ intervui pro la malafabla reago far kelkaj homoj. Sed pasio informi superas tion ĉion kaj ĉiumonate, vi havos enmane freŝajn novaĵojn pri Malagasio. Cetere, viaj reagoj estos bonvenaj por plibonigi la enhavon de nia gazeto. Aliflanke, ne eblas al mi ne danki vin pro tio, ke via abonado kaj perado helpas al mi vivteni la familion kaj mi estas konvinkita ke vi senĉese varbos antaŭ aliaj geamikoj viaj por ke ankaŭ ili abonu nian gazeton. Al vi ĉiuj dankegon !!!

KOMPRENI LA SINSEKVAJN POLITIKAJN KRIZOJN

1972

Amaso da homoj manifestaciis tra la ĉefurbo kaj forbruligis la urbdomon, ĉasante la regimenton de prezidenta gardistaro. Trideko da homoj mortis pro pafado far tiu gardistaro. La ĉefa motoro de manifestacioj estis la studentoj de la medicina fakultato ĉar ili denunciis la malegalecon en la eduka sistemo, kiu lezis la gefilojn de la simplaj civitanoj kaj favoras tiujn de la estrara klaso. La manifestacioj postulis ankaŭ la malagasigadon de la edukado kaj forigon de francaj kunlaborantoj en ĉiuj ministerioj. La evento kondukis al disfalo de la unua respubliko kun la prezidento Tsiranana. De tiam, la nomo de la placo de la forbruligita urbdomo iĝas « Placo la 13an de majo 1972 ».

1991

La protesta deirpunkto estis la Placo la 13an de majo 1972. Dum monatoj, miloj da homoj amasiĝis tie. Ili denunciis la monopolan regadon far la politika partio de la prezidento, kio favoris koruptadon kaj nepotismon. Kelkaj politikistoj defilis kun la homamaso direkte al la prezidenta palaco en lavoloha je deko da kilometroj de la urbocentro la 10an de aŭgusto 1991. La soldatoj pafmitralis de helikoptero la manifestaciojn. Cento da homoj mortis aŭ fizike malaperis. Disfalas la socialisma reĝimo de Didier Ratsiraka.

2002

La urbestro de Antananarivo Ravalomanana Marc instigis la homojn manifestaci kontraŭ Ratsiraka en la Placo la 13an de majo 1972. Ili protestis kontraŭ la truki-ta rezultato de la prezidenta balotado. Miloj da homoj amasiĝis tie ĉiutage dum pluraj monatoj. La tiama prezidento starigis la t.n. « aŭtonomajn provincojn » kaj instigis siajn partianojn bloki ĉiujn enirejojn al Antananarivo por ekonomie izoligi ĝin. La ĉefurbaj enloĝantoj vivis sen proviziumado, altiĝis la vivkosto. Generaliĝis la manko. Ravalomanana financis apartajn soldatojn por enrompi la blokilojn starigitajn ĉe la enirejoj al la ĉefurbo. Multaj homoj mortis kaj militoj inter triboj komenciĝis sed tuj haltis kiam Ratsiraka kaj liaj samsortanoj forfuĝis al Francio. Denove disfalis lia reĝimo.

2009

La juna urbestro Andry Rajoelina suferis pro la politika fiago far la tiama prezidento Ravalomanana. Tiu lasta ankaŭ monopolis ĉiujn ekonomiajn sektorojn por avantaĝigi sian gigantan firmaon *Tiko*. Li ne pagis ŝtatajn impostojn kaj sekrete vendis al iu korea firmao milojn da hektaroj de kultivebla grundo. Andry Rajoelina instigis la homojn manifestaci en la Placo la 13an de majo dum monatoj kaj estris la amasopolon al la prezidenta palaco en Antaninarenina. La gardostaro pafis la manifestaciojn kaj trideko da homoj mortis. La havaĵoj de la prezidento en la tuta lando estis atakitaj kaj forrabitaj. Pro minaco far grupo de soldatoj, Ravalomanana estis devigita demisii kaj transdonis la povon al kelkaj oficiroj, kiuj siavice transmetis ĝin al Andry Rajoelina. Ravalomanana forfuĝis ĝis nun al SudAfriko. La lando vivas sub la sankcioj far la internacia komunumo.

La sama historio cikle ripetiĝas sed la lokaj politikistoj ne volas ŝanĝi sian sintenon. La samaj eraroj aperas :malbona mastrumado de la nacia riĉaĵo, nepotismo, koruptado kaj pliriĉiĝo de la estrarana klaso... La popolo pli kaj pli sinkas en mizeron.

Kial la popolo cikle manifestacias por renversi la reĝimon ? Jen estas demando kiu bezonegas klarigon. Fakte, la popola postulo estas la sama de 1972 ĝis nun : ĝi vivas malriĉe dum la lando superabundas je subteraj minaĵoj, fekundaj kultivendaj grundoj kaj fiŝoza maro... Nur la regantoj kaj ties eksterlandaj « partneroj » profitas el tiaj riĉaĵoj. Malagasoj deziras ke la situacio pliboniĝu, ke iliaj infanoj estu taŭge edukitaj kaj ke ĉiuj sekure vivu kaj laboru. Do temas pri tute bazaj bezonoj, kiujn la politikistoj ne kapablas plenumi malgraŭ la mielaj promesoj faritaj dum la propagandoj. La popolo sentas sin fitrompita, tial ĝi denove manifestacios kaj renversos la venontajn registarojn.

Fakte, la popola postulo estas la sama de 1972 ĝis nun : ni vivas malriĉe dum la lando superabundas je subteraj minaĵoj, fekundaj kultivendaj grundoj kaj fiŝoza maro... Nur la regantoj kaj ties eksterlandaj « partneroj » profitas el tiaj riĉaĵoj

Panoramo de La GRANDA INSULO

celas informi pri la ĉiutaga vivo de simplaj civitanoj en Malagasio
Ĝi aperas monate krom en julio kaj aŭgusto
Abonprezo : € 30 jare la 10 numeroj
Eblas mendi de la redaktoro malnovan numeron

Varbejo : <http://www.noos.ch/am/malagasio.htm>

Redaktoro : FIDILALAO F. Henriel
poŝta adreso : lot IAH 32 bis Avaratsena
MG 102 AMBOHIDRAPETO (Madagascar)

Ĉiujn mesaĝojn bv sendi al :
<henrieldredtv@gmail.com>

Abonperantoj :

-Istvan Ertl (Luksemburgio),
kontakto : <istvan.ertl@gmail.com>
bv ĝiri vian pagon al lia konto
ĉe UEA : "ertl-d"
-Nicole Champion (Francio),
kontakto : <nicchampion@wanadoo.fr>
-Marion Belisle (Svisio),
kontakto : <belisle22@laposte.net>
-Fidilalao Henriel. Bv ĝiri vian pagon
al lia konto Skrill Moneybookers uzante
<henrieldredtv@gmail.com> aŭ ĉe
UEA: "fidi-d"

bv sciigi ankaŭ al la redaktoro vian ekabonadon

*Krom aparta mencio, ĉiuj artikoloj kaj fotoj estas de
Fidilalao F. Henriel. Estas malpermesite uzi tiajn
materialojn sen lia antaŭa permeso*

Kopirajto©januaro 2014 PGI-HENRIEL

(sekvo de la unua paĝo)

Rolis la CENIT kiel preparinto kaj kontrolinto

Precipe la nombro de voĉdonantoj devus esti ok milionoj sed pro la malkapableco de la CENIT, nur ses milionoj da ili akiris sian balotkarton kaj taŭge eniris en la balotliston dum la unua etapo. La situacio ne plu plibonigblas por la dua etapo de balotado. La CENIT montriĝis neprofesia malgraŭ tio, ke la Eŭropa Unio kaj aliaj



Regas ĉie malordo

apogintoj donis al ĝi milionojn da Eŭroj por bone organizi la balotadon. La celo estis starigi balotadkomisionon, kiu estas sendependa kaj aŭtonoma por ke la balotado estu libera, neŭtrala kaj travidebla. Do kreiĝis nova strukturo sed la agentoj de la CENIT ne povis kovri la vastan teritorion de la granda insulo tiel, ke ĝi estis devigita denove peti la helpon de la ministerio pri internaj aferoj, kiu kutime respondecis pri balotado dum la sinsekvaj reĝimoj. En la unua semajno de januaro, la CENIT oficiale deklaris la provizoran rezultaton : Hery akiris 53,50% dum Robinson gajnis 46,50%, tiu lasta ne ĉeestis la deklarceremonion kaj lia kampo, kune kun la eksa prezidento Ravalomanana, kontestis la rezultaton pretendante ke okazis « amasa ŝtelado de



Kiel forigi tiajn mizerojn ?

voĉdonoj ».

kaj findecidis la CES

Temas do pri speciala tribunalo, kiu juĝas ĉiujn balotajn aferojn kaj kies decido estas definitiva. Ekde la unua rezultato, la partianoj de Robinson premadas la CES-on por ke oni revidu ĉiujn voĉdonilojn kaj kontrolu ties unuopajn numerojn. Fakte, neniu konkretan pruvon povis liaj partianoj alportis antaŭ la CES, do apenaŭ ŝanĝiĝis la poentoj de ambaŭ kiam la CES definitive deklaris ke Hery estis la venkinto. Cetere, denove montriĝis ke la partianoj de la nova prezidento akiris la majoritaton en la parlamento.

La sorto jam decidis

Neniu scias kio okazos morgaŭ ĉar Robinson publike ne rekonis ke li estis venkita, tamen li neatendite ĉeestis la oficialan enpostenigon de sia kontraŭulo. Sed bombo eksplodis en la urbocentro la vesperon de tiu tago mortiginte unu infaneton. La partianoj de Robinson daŭre manifestacias interne de iu privata loko en Antananarivo. Aliflanke, la internacia komunumo unuvoĉe gratulis la malagasan popolon pro la sukceso de la balotadoj, eĉ Usono, kiu kutime defendis Ravalomanana-n ne mistrafis substreki la kuraĝon de la malagasa popolo eliri el la krizo. Ĉiuokaze, giganta tasko atendas la novan prezidenton por instigi la popolon subteni lin en la rekonstruado de la lando.